

# La Kalumeto

la bulteno de «Projekto Indiĝenaj Popoloj »  
aprilo-junio 2012

« Projekto Indiĝenaj Popoloj » celas prezenti Esperanton al indiĝenaj popoloj tra la mondo kaj faciligi komunikadon inter indiĝenaj popoloj kaj individuoj per Esperanto. Ĝi celas ankaŭ informi esperantistojn pri la situacioj de indiĝenaj popoloj kaj pri kiel popoloj indiĝenaj kaj ne-indiĝenaj povas interagi. Ni kredas ke indiĝenaj popoloj ofte alfrontas similajn situaciojn, exemple: perdoj de terenoj, mondoperceptoj, kaj tradicioj. Ni plu kredas ke komunikado, per Esperanto aŭ alimaniere, helpas indiĝenojn subteni unu la alian kaj pli bone diskonigi siajn kulturojn. Samtempe, PIP komprenas ke multaj indiĝenaj grupoj sentas profundan bezonon revivigi, gardi, kaj antaŭenigi siajn proprajn lingvojn.

Bariloj aŭdelblaj kaj videblaj

La malbona novaĵo: Pluraj malsimilecoj disigas la dialektojn de la inuita lingvo de Groenlando (Danio), Kanado, kaj Alasko (Usono). La malsimilaĵoj rilatas ne nur al sonoj kaj vortoformoj, sed ankaŭ al skribaj formoj. Utiliĝas la romana alfabeto kaj du silabosistemoj.

La bona novaĵo: Dum pluraj jaroj, plievidentiĝis kaj ankoraŭ evidentiĝas al inuitaj interesuloj ke lingva unueco estas grava kaj pritraktinda temo.

Krom la pluraj teknikaj demandoj pri la kreado de komuna, “artefarita” dialekto kiu havas utiligeblan leksikonon, sonsistemon, kaj skribmanieron, estas filozofia malakordo kiu povos malebligi la ŝanĝojn kiujn kelkaj personoj esperas realigi. Kelkaj inuitoj defendas la kutimajn lingvoformojn de diversaj regionoj kaj vilaĝoj, kies enloĝantoj sentas pli-malpli fortan rilaton al la historio kaj apartigita disvolviĝo de sia loka dialekto kaj tiel plu. Aliflanke, kelkaj inuitoj sentas la bezonon evoluigi komunajn vortojn rilate administradon de sovaĝaj terenoj, bestojn kaj plantojn, sanon, klimato-ŝanĝiĝadon, kaj region de toksaj forĵetaĵoj. La inuitoj kiuj havas tiun sintenon kredas ke tiuj evoluoj ne nur ebligos pli intensan pritraktadon de la koncernaj temoj inter inuitoj de pluraj landoj kaj regionoj, sed ankaŭ ebligos al inuitoj ke ili kohere sin prezentos kiam ili partoprenos eventojn regionajn aŭ internaciajn. Verŝajne, temas pri tiuj, kiuj kredas ke la estonteco de la inuita lingvo kaj kulturo estas en la vilaĝo kaj tiuj, kiuj kredas ke la inuita kulturo kaj vidpunkto rilatas aŭ povos plene rilati kun la tuta mondo.

Demandindaĵoj: Ĉu vilaĝa vivo kaj internacia vivo ne povas trovi vojon por reciproka kompreno kaj alta mem-estimo? Ĉu ĉiu lingvo kaj kulturo ne havas fortajn enajn kaj eksterajn aspektojn?

(Informofontoj: “Nunavut summit ponders standardized Inuit language” [Gravula konferenco konsideras normigitan inuitan lingvon], *Nunatsiaq Online*, la 18-an de februaro 2011, kaj “Demystifying “standardization of the Inuit language” [Malperpleksigado de la “normigado” de la inuita lingvo], *quituttugaujara* (blog ĉe Bogspot) fare de Jpt/Jay Amakak.)

### Legipoveco kaj “aĝamio”

Ĉu vi ne rekonas la vorton “aĝamio”? Tio ne devus esti surprizo, ĉar mi ĵus inventis ĝin! Aĝamio estasi vorto derivita de la araba, vorto por “fremda” aŭ “ne-araba”. Pli specife, la signfo de la vorto rilatas al la uzado de la araba alfabeto kiam oni skribas ne-arabajn lingvojn, ekzemple, la svahilan.

Aĝamio gravas rilate je afrikaj verkistoj en kaj legantoj de lingvoj kiujn oni skribis per alfabeto kiu estis esencie la araba, kun ŝanĝetoj por akomodi la sonosistemon de la celolingvo. (Kompreneble, tiu situacio estas konata de uzantoj de la romana alfabeto, per kiu pluraj lingvoj sin esprimas en Afriko, Latinameriko, kaj aliaj regionoj—eĉ en Esperantio!) La lingvo ne estas problemo; la alfabeto estas la problemo, kaj tiu problemo estas ke en kelkaj landoj, persono kiu legas kaj skribas version de aĝamio, sed **ne** legas version de la romana alfabeto ne estas konsiderata legipova. Kontraste, la persono kiu povas legi kaj skribi la saman lingvon per la romana alfabeto estas konsiderata legipova! Mi imagas ke la fakto ke la romana alfabeto estas la alfabeto de la angla, la franca, kaj la portugala grave influas la situacion en Afriko pro historiaj kialoj. Persono en, ekzemple, Niĝerio, kiu legipovas la romanon alfabeton povas lerni legi gravajn vortojn, ekzemple “haltu—danĝero” en la angla, la pontolingvo de tiu lando, kvankam persono kiu legas nur la araban/aĝamian alfabeton havus multe pli malfacila tasko se li aŭ ŝi penis legi tiujn vortojn. Similaj problemoj ekzistas rilate la instruadon de la aĝamia skribosistemo; en registara lernejo oni lernas la romanon alfabeton, en la islama Koran-lernejo oni lernas la araban alfabeton *nur por esprimi la araban*, sed verŝajne oni malofte instruas nuntempe la aĝamian skribosistemon. (Ĉiu lingvo kiu uzas tiun alfabeton uzas la propran sistemon de punktoj kaj similaĵoj por esprimi sonojn kiuj ekzistas en la celolingvo, sed ne en la araba.)

Eble la situacio hodiaŭ ŝajnas negrava pro la fortega situacio de la romana alfabeto en pluraj landoj de Afriko. Tamen, la pli fruaj kaj pli sendependaj (ne-koloniaj) registroj pri afrika historio ofte skribiĝis per iu versio de la aĝamia

alfabeto; pro tio, la laŭlingvaj versioj de la aĝami-sistemoj estas historie gravaj, kaj en kelkaj lokoj, tiuj sistemoj estas ankoraŭ aktualaj. Lingvo-kleruloj en Afriko devos multe agi por restaŭri bonan pozicion por la aĝamia alfabeto. Kunordigita studado kaj instruado estas necesaj inter kleruloj de diversaj landoj—gravaj kaj defiemaj postuloj!

(Informofonto: “From Africa, in Ajami” [El Afriko, Aĝamie], *Saudi Aramco World*, septembro/oktobro 2011.)

## **PRI KAJ DE UNUIĜINTAJ NACIOJ:**

### **La Jarmilaj Evoluigaj Celoj**

En multaj landoj, je multaj okazoj, ni jam aŭdis pri la Jarmilaj Evoluigaj Celoj (celar-plenumiga jaro: 2015). Mi aperigas ilin ĉi tie por ke la legantaro pripensu ilin rilate indiĝenajn infanojn, familiojn, kaj kulturojn. Mi petas ke vi sendu al mi viajn reagojn kaj komentojn.

La celoj:

- elradikigi ekstreman malriĉecon
- atingi universalan elementan edukadon
- antaŭenigi seksan egalecon kaj doni povon al virinoj
- redukti la nombron de infanaj mortoj
- plibonigi patrinan sanon
- kontraŭbatali seropozitivecon/aidoson, malerion, kaj aliajn malsanojn
- certigi la daŭripovecon de la naturmedio
- starigi tutmondan partnerecon por socia kaj ekonomia evoluado.

Post legado de la celoj, mi demandas, ekzemple, kiel oni difinas ‘malriĉecon’. Ĉu temas pri nehavo de mono? Pri nekapablo subteni sin en iu ĉirkaŭaĵo? Pri nehavo de socia subtenreto? Simile, kian rezulton ni povas esperi se malpli da infanoj mortos en izolita rezervejo? Ĉu en ĉiuj kazoj la ĉirkaŭa naturmedio povos subteni pli grandan loĝantaron?

Pripensu kaj demandu aŭ komentu, mi petas!

### **“Diverseco, la sola vojo al daŭrigebla paco kaj disvolviĝo”**

(Eroj de la teksto de la Deklaro de la Fako pri Publikaj Informoj por Ne-registaraj Organizoj, Bonno, Germanio, 3-5an de septembro 2011, prepara je la Konferenco de Unuiĝintaj Nacioj pri Daŭrigebla Disvolviĝo (Rio-de-Janeiro + 20), okazigota en Rio-de-Janeiro, junio 2012.)

La deklaro-preparintoj alarmiĝis pro la kreskanta perdo de biodiverseco, la kvanto de desertiĝo, senarbariĝo kaj arbara malkomponiĝo tutmonda, la seniĝo de fiŝkaptaj rimedoj, kaj la plimalbonigitaj efikoj kiuj rezultas de tutmonda varmiĝo.

La preparintoj rekonas ke biodiverseco kaj lingvodiverseco estas nedisigeblaj; ili alarmiĝis pro la perdo de tradicia kono kaŭzita de la perdo de lingvoj.

La deklaropreparintoj sentas zorgojn pri klimato-ŝanĝado kaj ĝiaj efikoj, inklude la pliintensiĝon de la perdo de biodiverseco, la acidiĝo de la oceanoj, kaj la seniĝo de polusa glaciaĵoj diversspecaj.

*Mi emfazis ĉi tiujn deklarerojn pro tio ke ili pritemas aŭ lingvojn aŭ loĝejojn indiĝenajn. El la loĝjoj aŭ ĉirkaŭaĵoj kaj la situacioj kiuj okazas pro la tieaj kondiĉoj, naskiĝas specifaj vortoj enfokusigitaj por esprimi gravajn erojn de la loka vivmedio kaj lertecoj por transvivado.*

La deklaropreparintoj agnoskas ke volontulismo iĝas tre grava por inspiri la mond-evoluan dialogon. Ĝi devus gvidi ĉiujn pensontojn al la kunkreado de vizio pri la starigo de tutmonda komunaĵo pri edukado, junula aktivismo, kaj mem-organizado kaj komuna agado.

*Ĉi-lastan deklaron mi citas pro tio ke mi kredas ke tre gravas ke esperantistoj sin komprenas kaj sin prezentas al la mondo kiel voluntuloj pri monda komunikado / dialogo kaj kultura kundivido. Mi kredas ke estas netaŭge ke oni priskribu Esperanton kiel "flankokupon." Laŭ mi, oni priskribu ĝin kiel gravan eron de mondskala aktivismo.*

La deklaropreparintoj vizias ke en la estonteco estos inter kultivitaj kamparoj naturaj aŭ restaŭritaj areoj kiuj povos esti fontoj de polenado, limigejoj pri trudbestoj, kaj lokoj de terenofekundiĝo. *(En tiuj areoj, indiĝenaj grupoj povos havi loĝejojn aŭ ceremoniajn situojn.)*

La preparintoj subtenis respekton kaj inkludon de etnaj lingvoj en eduksistemoj, kaj konsideradon de neŭtrala, internacia lingvo *(sendube volapuko!)* kiel paŝo al neŭtraleco kaj daŭrigebleco.

La deklaropreparintoj agnoskas muzikon kiel naturan kaj tutmondan rimedon kiu pova ligi generaciojn kaj komunumojn. *(Ni rimarku ankaŭ ke en multaj indiĝenaj komunumoj, ne ekzistas poezio sen samtempa kantado, kaj ke muziko ofte akompanas kulture gravajn ceremoniojn.)*

La preparintoj sugestas la konstruadon de “laboratoriaj lernejoj en la socia ĉirkaŭaĵo de post-konflikta disvolviĝo” kiuj povos disvolvi “tuteco-celajn” civitanojn. (*Esperanto estu unu el tiuj studotemoj!*)

(Informofonto: [www.uncsd2012.org/rio20/content/documents/634DPI.pdf](http://www.uncsd2012.org/rio20/content/documents/634DPI.pdf)—serĉu la liston por trovi la anglalingvan version, “United Nations Department of Public Information”).

### Kulturaj pejzaĝoj

Informoj el la retpaĝo de UNESCO, World Heritage Committee, Cultural Landscape / Komitato pri Mond-Heredaĵo, Kulturaj Pejzaĝoj.

“Ekzistas pluraj specoj de pejzaĝoj kiuj estas tipaj en diversaj mondoregionoj. Kombinitaj esprimoj de naturo kaj la homaro, [kulturaj pejzaĝoj] esprimas daŭran kaj intiman rilaton inter gentoj kaj iliaj naturaj ĉirkaŭaĵoj. Iuj sitoj montras la uzadon de specifaj teknikoj de teren-uzado kiuj garantias kaŝi daŭrigas biologian diversecon. Aliaj, rilatitaj en la pensmanieroj de komunumoj kun potencaj kredoj kaj artaj kaj tradiciaj kutimoj, enkorpiĝas la ekstraordinaran rilaton inter homoj kaj la naturo.”

Unesko ellaboris kvar klasojn de pejzaĝo kiuj rezultas de homa intervenado aŭ uzado. Tiu listo estas utila ne nur al spertuloj kaj kleruloj, sed ankaŭ al tiu, kiu simple deziras pensi pri aŭ viziti sitojn tre diversajn je geografio, terenuzado, kaj kondiĉoj aktalaj aŭ antaŭaj.

Jen la klasoj:

---Establita pejzaĝo: Klare dezajnita fare de homoj. Ekzemple, ĝardeno aŭ parko kreita por estetikaj celoj.

---Antaŭa, organika pejzaĝo: Evoluigita laŭ homaj planoj, sed ne plu uzata. Tiaj pejzaĝoj montras interagadon kun naturo kiu ne estis tiom forta aŭ drasta, kaj ne precipe pro estetikaj celoj.

---Aktuala, organika pejzaĝo: Kiel la antaŭa, sed kun aktuala, homa partoprenado per praktikoj, teknikoj, kaj decidomanieroj kaj tradiciaj kaj modernaj.

---Asociiĝa pejzaĝo: Sen homa influo aktuala aŭ antaŭa, sed la pejzaĝo estas signifa al gento aŭ gentoj pro kulturaj aŭ religiaj motivoj.

La sistemo do inkluzivas diversajn nivelojn de homa interveno, de formala kaj forta ĝis neniuj, kaj pro diversaj kialoj, ekzemple, agrikulturo, religio, aŭ administrado. Ekzemploj de kulturaj pejzaĝoj: kavernoj kiuj enhavas mur-

pentraĵojn, tradiciaj komerco-vojoj, argila arkitekturo, flosantaj ĝardenoj kaj terasaj kultivejoj.

Ni lingvemuloj plu diru ke kulturaj pejzaĵoj estas interesaj ankaŭ pro tio ke ili produktas vortojn kiuj esprimas siajn geografion, geologion, rilatojn kun bestoj kaj plantoj, mitoj, rakontoj, kantoj, k.s..

**Estus tre interese sed legantoj kiuj loĝas en landoj en kiuj ankaŭ loĝas indiĝenaj aŭ tradiciaj gentoj, aŭ kiuj studis aŭ vizitis tiajn gentojn, priskribus siajn kontaktojn kun kulturaj pejzaĵoj de iu ajn speco. Tiel, la internacia legantaro de ĉi tiu bulteno povus kundividi sciojn kaj travivaĵojn unu kun alia.**

(Informofonto: La retpaĝaro de Unesko (“cultural landscape”).)

### “Rigardi en la direkton de kiu vi venis”

Elisapie ISAAC estas kanada kantistino kaj filmistino de inuita patrino kaj blankula patro. Ŝi havas fortan ligan kun la inuita kulturo de norda Kanado, ĉar ŝi estis adoptita de inuita familio kaj loĝis plurjare en inuita vilaĝo. (Ŝi nun loĝas en Montrealo.)

Kiel multaj juna inuitoj, s-ino Isaac sentas sin inter du kulturoj. Grava persono por ŝi estis unu el siaj avoj, kiu instruis al ŝi ke por eviti perdiĝon, oni rigardu la direkton de kiu oni venis. S-ino Isaac faras kontraston inter sia avo, kiu, laŭ sia esprimo, “rifuzis la donacojn de la blankuloj,” kaj la juna generacio, kiu “akceptis la donacojn,” kaj kies vivmaniero rilatas pli ol antaŭe al usona kulturo kaj malpli al la tradicia kulturo. La kultura ŝanĝo kaŭzas diversajn problemojn, ekzemple: memmortigon kaj problemoj pri la misuzado de mono. S-ino Isaac komentas ke la problemo estas kiamaniere la Inuitoj povas konservi iun version de la aboriĝena kulturo kaj samtempe iĝi krea ero de la nuna mondo. Laŭ s-ino Isaac, Inuitoj devas krei la proprajn solvojn, ne nur prunti solvojn de blankulaj kulturoj.

Unu ero de la inuita kulturo kiu ankoraŭ bone funkcias estas la lingvo. La izoliteco de multaj inuitaj vilaĝoj kaj la problemoj pri vojaĝado fortigas la situaciojn de indiĝenaj lingvoj, kaj indiĝenoj kiuj deziras daŭrigi siajn kontaktojn kun siaj tradicioj uzas la indiĝenan lingvon kiel kontaktilon tra tempo kaj inter samgentanoj. (S-ino Isaac kantas inuitlingve [inuktitude], angle, kaj france, kaj daŭrigas sian serĉadon pri la pluraj manieroj per kiuj oni povas esti inuka (inuita vicgento) kaj fieri pro tio.

(Informofontoj: *PRI's The World*, "Inuit Singers Eliapie Isaac and Simon Lynge," la 23-an de novembro 2011, kaj *The Fire*, "Profile: Elisapie Isaac," ambaŭ el la Interreto.)

### "Intimaj Renkontiĝoj" (poem-eltiraĵo)

verkis usona, osaĝo-genta poeto/verkisto (s-ro) Carter REWARD

"Ni anoj de la osaĝa gento malsupreniris,  
kiel la Nom-donaca Ceremonio rakontas,  
de la steloj.  
Ni antaŭenirigis niajn mesaĝoportantojn  
por lerni kiel fari niajn korpojn,  
kiel gentigi nin,  
trovi potencon por antaŭeniri,  
movi kiel la suno kiam ĝi ĉiutage leviĝas,  
transiri la ĉielon al la okcidento  
kaj bele subiri en la nokton,  
akompani denove la stelojn  
por serene transiri la ĉielon  
kaj leviĝi denove, permesante  
ke la du blankaj lumfaskegoj apud la suno  
iĝu blankaj agloplumoj en la hararoj  
de infanoj dum ni donas al ili iliajn nomojn.

Kiam ni malsupreniris, niaj mesaĝoportantoj  
renkontis estaĵojn  
kiuj permesis ke ni prenu iliajn korpojn,  
kun kiuj ni vivas en la pacajn tagojn;  
ni rekontis Tondron kaj Pumon,  
Ruĝbirdon kaj Cedroarbon,  
Nigran Urson kaj Oran Aglon.  
Agloforme ni malsupreniris,  
kaj ĉe la plej altaj kverkobranĉoj  
ni ripozis, skuis per nia pezo  
la branĉojn tiel ke glanoj falis pluvece, semoj  
por novaj kverkoj kaj nia ĉiutaga pano.

(Informofonto: *Native North American Literary Companion*, redaktistoj: Joseph BRUCHAC kaj Janet WITALEC.)



### La plantopatrinoj de la inkaoj

“Inter la inkaoj, la vorto “mama” signifis ne nur la patrino de ido, sed ankaŭ la spirito de kultivitaj plantoj. (Indiĝenaj grupoj en Brazilo havas hodiaŭ la saman kredon kaj vortuzadon.) Plej grava estis la “saramama,” aŭ “maiz-patrino”. Figurojn de la “patrinoj” oni faris el ŝtono, aŭ, kaze de la maizpatrino, el maizotrunketo. Oni foje faris denove la maizotrunketajn figurojn post rikolto. Sacerdotoj oferis al la figuroj, kaj eĉ faris al ili demandojn; ili demandis al la trunketa figuro ĉu ĝi kapablos ekzisti dum la venonta jaro. Se la figuro nee respondis, la sacerdoto faris la saman demandon al alia figuro, kiu eble anstataŭis la originalan. Tiel la plantospirito kaj la homoj bontenis sian rilaton.”

(Informofonto: *The Myths of Mexico and Peru*, de Lewis Spencer, 1913, rete legebla en la angla ĉe: [www.sacredtexts.com](http://www.sacredtexts.com).)

### Rakontistaj komentoj

La usona magazino *Native Peoples* [indiĝenaj gentoj] aperigis en la numero “majo-junio 2012” artikolon pri indianaj kaj plur-rasaj rakontistoj en Usono. Estis al mi interese ekscii ke kelkaj el ili prezentis sian rakontojn ne nur en Usono, kie ĉiuj el ili naskiĝis, sed ankaŭ en diversaj landoj, eble pro tio ke rakontado estas esprimoformo vere intergenta kaj internacia.

Jen mallongaj komentoj kiun kelkaj el la rakontistoj faris en la artikolo:

**Ramona Walema:** “Mi vidas viziojn. Mi vidas la tutan bildon de la rakonto, kaj tiel mi elkomprenas ke ĝi estas io pri kio verki kaj paroli.” Pri la reagoj de aŭdantaro: “Mi estas en la rakonto-mondo, kaj la aŭdantaro apartigas sin de siaj problemoj. Ili estas feliĉaj; tion mi amas.”

**Joseph Brucak:** Pri la plej grava leciono kiun li lernis dum sia multjara lernado kaj prezentado de rakontoj: [Mi lernis] esti tre, tre dankema pro la renaskiĝo de rakontoj en indianaj komunumoj.” (S-ro Brucak uzis rakontojn kiel instruilojn kun siaj filoj, Nun la patro kaj unu el la filoj kune prezentas rakontojn; la patro rakontas per la angla, la filo per la abenaka (indiĝena lingvo.)

**Mary Louise Defender Wilson:** Ŝi kredas ke tradiciaj rakontoj restas gravaj je tiuj situacioj en kiuj la plej bazaj bezonoj tre fortas: manĝaĵo, kolerio, socia premo, kaj sekso. Ŝi komentis, “La ero kiu defias kaj interesas min estas kiel rakonti por ke la rakonto koncernu la aŭdantaron. Tio ĉiam estas stimula.”

Erik Felker / [eifelker@dslextrreme.com](mailto:eifelker@dslextrreme.com)

414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank, CA 91501 / U.S.A. / Usono